RECIM MONDO

Aŭtuno 2004 n° 1

*Interna bulteno de Registrolibro de la Mondcivitanoj kaj de la tutmondiĝintaj komunumoj*

ENHAVO

Doni sencon al agado p. 1
Rigardo pri historio p. 1-2
**Registrocentroj kaj Korespondantoj** p. 3 ĝis 7
Kiu statuto ? Kiu diferenco ?
Gazeta recenzo
Novaĵoj el Registrocentroj kaj Korespondantoj
Listo de la Centroj kaj Korespondantoj
**La tutmondiĝoj** **p. 8**
**Mbanza Ngungu**
**Chelles : Maurice Schoirfer**
**Cahors**
**Dison**

Registrolibro kaj UNESKO p. 9
Honorinda mondcivitano p. 9
Ĝenerala organigramo p. 10
ASKOP p. 11
Kunvenoj de la 12 kaj 13aj de marto 2005 en Parizo p. 12

**La bulteno RECIM-Mondo celas :**

- la Registrocentrojn de la Civitanoj de la Mondo
- la Korespondantojn de Registrolibro
- la Kongreson de la Popoloj
- kelkajn tutmondiĝintajn urbojn kaj komunumojn
- kelkajn organizaĵojn, kiuj klare aliĝis al tutmondismo

# Doni sencon al agado

La aktiveco de Registrolibro de la Mondcivitanoj pli kaj pli graviĝas kaj faras el ĝi konverĝan centron de multaj informoj. Ni dankas ĉiun, kiuj sendas al ni siajn leterojn, agadraportojn, bultenojn. Sed nun ŝajnas al ni necese, ne kontentiĝi klasifiki kaj arkivi ĉion, sed male, transdoni la informojn al ĉiuj al kiuj ili povas utili en nia komuna progreso al monda demokratio. Ŝajnas al ni grave, ke la agantoj de la demokrata tutmondiĝo sin konu unu la aliajn, ekrilatu, reciproke rekonu la valoron de la engaĝiĝo kaj de la aktiveco de iuj kaj de aliaj, kaj ke interŝanĝaj kaj interhelpaj retoj tiel stariĝu.

Ĝis nun tiu reciproka informiĝo okazis nur per prezentado de sinsekvaj aktivecoj dum la ĝeneralaj asembleoj kaj la kunvenoj de la Administra konsilantaro de Registrolibro. De nun, tiu sesmonata bulteno estos via, kaj ni plivastigas ĝin al la aktivaj tutmondiĝintaj urboj kaj komunumoj, ĉar Registrolibro de la Mondcivitanoj kaj la tutmondiĝa movado de la komunumoj devenas ambaŭ de la sama historio kaj ĉar la interagado inter ili ĉiam ekzistis.

La mondo nun progresas kun fulma rapideco al sia unuiĝo, sed kia unueco ? Jam multegaj voĉoj laŭtiĝas kontraŭ komerca, merkata tutmondiĝo tre rapide ne prikonsentebla de la plej multaj loĝantoj de la planedo, sed ankoraŭ tro malmulte da voĉoj montras la sekvendan vojon por eliri el la diktatoreca rutino de la mona profito. Tiu vojo estas tiu de monda demokratio, tiu de konstruado de pacema kaj civilizita mondo. Por tio laboru ni mem.

*Daniel Durand*
*Prezidanto de Registrolibro de la Mondcivitanoj*

# RIGARDO AL HISTORIO

## Esperoj kaj elreviĝo

**1945**. Finiĝas la milito, almenaŭ en Eŭropo, per la subskribo de armistico la 8an de majo. La tuta Eŭropo kaj ĉiuj landoj ligitaj al Eŭropo esprimas sian kvietiĝon pro la fino de la plej horora milito. De nun necesas rekonstrui : domojn, urbojn, vojojn, pontojn kaj kolektivajn ekipojn, kompreneble, sed ankaŭ restarigi la instituciojn, kaj interalie tiujn destinatajn por gardi la pacon. La Ligo de la Nacioj ne plenumis sian taskon kontraŭ la stariĝo de la militaj potencoj. Alia organizaĵo estas preparata por ĝin sekvi, kaj tiu organizaĵo estos tiu de la unuiĝo de la nacioj, de la unuiĝo de la mondo. Almenaŭ tion oni kredis ĝis la subskribo de la Ĉarto de Unuiĝinta Naciaro, en Sanfrancisko en junio 1945, kiam la ambasodoroj montriĝis ne kapablaj loki la novan organizaĵon je la alteco de la unueco, kiun la mondo atendis. Tute male, la Ĉarto preparita de taĉmento de tutmondistaj elpensuloj kaj juristoj, estis sabotita por fine konsekri la absolutecon de la naciaj suverenecoj. "*Murdemaj suverecoj*" laŭ la vorto de René Cassin, tiuj mem, kiuj kun aliaj kialoj, estis kondukintaj la mondon ĝis la abomeno de 60 milionoj da mortoj. Vere ne la politika

mondo ne komprenis la lecionon. De la koncepto de la ĉarto preparita de tiuj pensuloj restas nur la enkonduko : "Ni, popoloj de la mondo.." sed ĉio alia fariĝis aliigita pro naciaj egoismoj.

**Februare 1946**. En Parizo, **Robert Soulage**, eksa rezistanto, kiu batalis sub la nomo **Sarrazac** fondas kun du amikoj la "***Centron por tutmondisma esplorado kaj esprimo***". Poste kun dudeko da kunuloj, el kiuj ĉefe intelektuloj, li fondas la "***Homan Fronton de la Civitanoj de la Mondo***".

## Epopeo Garry Davis

**1948**. Usona eksa bombaviadila piloto restinta en Britio, ĵus malmobilizita, venas en Parizon por partopreni en la rekonstruado de Eŭropo. Lia nomo : Garry Davis. Bedaŭrinde liaj dokumentoj ne permesas lin restadi longtempe. Li devas forlasi la teritorion. Tiam li ribeliĝas, fakte per longtempe preparita ribeliĝo, forlasas la **25an de majo 1948** sian usonan civitanecon kaj decidas fariĝi senpatriulo ; li deklaras sin "**Civitano de la Mondo**" kaj simbole sin metas sub la aŭtoritaton de Unuiĝinta Naciaro. Fakte necesas scii, ke tiam la juna organizaĵo Unuiĝinta Naciaro havis sian sidejon en Parizo, en palaco Chaillot.

**La 12an de septembro** Garry Davis starigas sian tendon sur la ŝtupoj de la palaco kaj restadas en tiu internacia zono. La 17an de septembro, pro peto de UN, Garry Davis estas enkarcerigita. Solidareca komitato tiam konsistiĝas : Albert Camus, Jean Breton, Abato Pierre, Jean-Paul Sartre, Robert Sarrazac kaj multaj aliaj, kiuj aliĝas al tiu iniciatinta grupo laŭmezure, kiel la afero pligraviĝas.

**19an de novembro 1948**. Kun helpo de kelkaj kunuloj bone lokitaj, Robert Sarrazac kaj Garry Davis interrompas la Ĝeneralan asembleon de UN :

***Je la nomo de la Popoloj, kiuj ne estas reprezentataj tie ĉi****, mi interrompas vin (...) mi alvokas al vi, por ke vi tuj kunvoku* ***Mondan Konstituciantan Asembleon****, kiu supren levos la standardon, ĉirkaŭ kiu ĉiuj homoj povos ariĝi (...) Se vi ne plenumos tiun taskon, retiriĝu, Popola Asembleo stariĝos el la mondaj amaspopoloj por konstrui tiun registaron (...) .*

**9an de decembro 1948** : Kunvenego en la pariza vintra Ciklodromo, situanta je proksimume 10 piediraj minutoj de la palaco Chaillot. 17 ĝis 20.000 ĉirkaŭ Garry Davis kaj diversaj parolantoj. Tie Garry Davis legis mesaĝon de Doktoro Herbert Evatt, Prezidanto de la Ĝenerala Asembleo de UN. Furioza, aŭskultante, ke la Doktoro Evatt skribis : "UN ne ekzistas por starigi pacon, sed por gardi ĝin, kiam la ŝtatoj estos organizintaj ĝin", la homamaso komencis skande krii « **Al U.N. ! Al U.N. !** », postulante, ke Garry Davis kaj Robert Sarrazac gvidu la partoprenantojn por sturmi la palacon Chaillot. Sed Robert Sarrazac ne konsentis. « ***Ni, pariza popolo, ne rajtas fari tion sen mandato de la popoloj de la mondo, el kiuj kelkaj estas malproksime de tie ĉi kaj povus nur riproĉi al ni agadon sen atento pri ilia opinio*** ». La homamaso kvietiĝas, la perforta provaĵo evitiĝas.

La morgaŭon, **10a de decembro 1948**. Laŭ propono de René Cassin, la Ĝenerala asembleo de Unuiĝinta Naciaro proklamas la Universalan deklaracion de homaj rajtoj. Oni povas rimarki el tiu deklaracio la 28an artikolon : *Ĉiu havas rajton je socia kaj internacia organizo, en kiu la rajtoj kaj liberecoj difinitaj en ĉi tiu Deklaracio povas esti plene realigitaj*.

Alimaniere dirite, la tutmondismo estas tie proklamita kiel unu el la homaj rajtoj.

**24an de decembro 1948.** La Prezidento de la Franca respubliko Vincent Auriol akceptas Garry Davis kaj permesas lin libere restadi en Francio.

*Kroma historio : Vincent Auriol sin mem deklaris Civitano de la Mondo en februaro 1950, kaj tute hazarde en majo 1979, Registrolibro trovis aĉetotan lokalon en la bulvardo, kiu jam portis la nomon de tiu eksa Prezidento.*

## Registrolibro kaj Tutmondiĝoj

Fine de decembro 1948. Pro la abundeco da leteroj estigita pro la eventoj de la 19a de novembro kaj 9a de decembro, la Centro por tutmondisma esplorado kaj esprimo decidas organizi Sekretariaton de la Mondcivitanoj, kaj ankaŭ ties teknikan organon : la Internacia Registrolibro de la Mondcivitanoj. Tion anoncas Garry Davis la 1an de januaro 1949.

**1a sesmonato de 1949** : dum la Sekretariato de la Mondcivitanoj senĉese laboras (30.000 leteroj el 55 landoj estis ricevitaj fine de februaro), la Centro por tutmondisma esplorado kaj esprimo daŭrigas sian laboron interalie per kontaktoj kun aktivuloj en Cahors.

**20an de julio 1949**. La municipo de Cahors adoptas la tutmondiĝan ĉarton. Cahors fariĝas "**Urbo civitana de la mondo**". Tiu balotado estas poste konfirmita per popola referendumo, per kiu 59 % de la voĉdonantoj jesis. Tio estas la komenco de ampleksa movado, ĉar nun oni nombras 960 tutmondiĝoj en 13 landoj de 4 kontinentoj. Nur 20 el tiuj tutmondiĝintaj komunumoj partoprenis en voĉdonoj al la Kongreso de la Popoloj.

En tiu mallonga historia rigardo, oni vidas, ke la eventoj, kiuj markis 1948 kaj 1949 okazis pro la kruciĝo de pluraj destinoj :

- tiu de pensofluo, portita de manpleno da intelektuloj kaj aktivuloj ;
- tiu de du viroj, Garry surscenigita, Roberto restinta diskreta, ambaŭ animitaj per sama volo, ke milito fariĝu neebla ;
- tiu de la homaro, kies institucioj ankoraŭ ne sukcesis eliĝi el la naciisma kaptilo.

Same klare evidentiĝas, ke la registrado de homoj, kiel civitanoj de la mondo, kaj la tutmondiĝo de komunumoj havas la saman devenon kaj la saman historian sencon.

*Daniel Durand*

# REGISTROCENTROJ KAJ KORESPONDANTOJ

***Por helpiĝi en sia tasko, la Registrolibro de la Mondcivitanoj starigas aŭ aprobas Registrocentrojn kaj Korespondantojn.***
***Kiu diferenco ekzistas inter Registrocentro kaj Korespondanto ? Kio estas ilia rolo ?***

## Registrocentro

**Registrocentro** estas strukturo kun asocia formo konforma al la loka leĝaro, taskita per la enregistrado de la homoj, kiuj sin rekonas Civitanoj de la mondo. Sed ĝi ne estas nur registra strukturo, ĉar por funkcii ĝi bezonas fariĝi konata kaj do ĉeesti en la vivo de la ĉirkaŭa civila socio.

### Asocio

Por rekoni Registrocentron, la Registrolibro postulas, ke tiu ĉi konsistu almenaŭ el tri homoj : prezidanto (aŭ direktoro), sekretario kaj kasisto. Tiuj tri homoj devas strikte kunlabori kaj ĉiu el la tri devas bone koni la aferojn de la Registrocentro, tiamaniere, ke okaze de manko de unu el ili, la servo povu daŭri.

### Universala kompetenteco

Depost la reformo de la Registrolibra statuto, la 28an de oktobro 2000, Registrocentro difiniĝas per areo, kiu ne devige kongruas kun la limoj de la ŝtato, en kiu ĝi staras. Dum iu Registrocentro povas ampleksi plurajn ŝtatojn, povas ekzisti pluraj centroj en tro vasta ŝtato por nur unu centro aŭ kies loĝantaro estas dividita en pluraj lingvaj komunumoj. Ankaŭ povas ekzisti transnaciaj Registrocentroj aŭ internaj al gravaj strukturoj : tiel la Esperantista Internacia Centro aŭ tiu kreita en 1992 interne de la mondfederaciista movado, sed kiu fakte neniam efektiviĝis. Tamen dum centro havas sidejon klare difinitan, ĝia kompetenteca areo estas senlima.

### Rimedoj.

La financaj rimedoj de Registrocentro dependas rekte de la nivelo de ĝia aktiveco. Tiuj rimedoj konsistas : el la duono de la produkto de la vendo de la Mondcivitanaj legitimkartoj kaj el triono de la memvolaj kontribuaĵoj pagitaj de la Mondcivitanoj. Se la centro produktas bultenon, ĝi normale gardas du trionojn de la memvolaj kontribuaĵoj. La diferenco estu jare transpagita al la Mondcivitana Registrolibro. La Registrocentroj mem liveras la mondcivitanajn legitimkartojn, laŭ la petoj, kiujn ili ricevas.

### Bulteno

Do la centroj havas taskon pri informado, kiu devas atingi kaj la publikon kaj tiujn jam enregistritajn. Por tio la tradicia rimedo estas la disdonado de bulteno. La plej fruaj centroj disdonas sian propran **bultenon** (Francio, Kanado, Japanio kaj Belgio) kaj por tio ili bezonas ricevi informojn por transkonigi : ili estas la protokoloj de la kunvenoj : ĝeneralaj asembleoj, administraj konsilantaroj, protokoloj de debatoj kaj aliaj. Tiuj informoj tamen ne sufiĉas. Tial Registrolibro kreas tiun novan bultenon ***RECIM-Mondo*** por mutualigi la informadon inter ĉiuj agantoj de la monda demokratio.

### Reprezentado en Registrolibro

Pro sia memdevontigoj la tri responsantoj de Registrocentro fariĝas ankaŭ membroj de Mondcivitana Registrolibro, ricevas ties informadojn kaj estas elekteblaj al la Administra konsilantaro.

## Korespondanto de Registrolibro

**Korespondanto de Registrolibro** estas izola individuo, kiu konsentas kun Registrolibro pri ties reprezentado en regiono, urbo, komunumo aŭ medio. Tiu reprezentado estas neformala, sen aparta statuto, krom en kelkaj afrikaj landoj kie necesas permeso por plenumi aktivecon.

La kompetenteca areo rezultas el la sama principo, kiel tiu de Registrocentro : adreso bone difinita, por loka servo, sed sen difinitaj limoj.

La financaj rimedoj konsistas nur el la duono de la produkto de la vendo de la mondcivitanaj legitimkartoj. La dosieroj pri enregistropetoj estas transdonataj al la Internacia Registrocentro (Parizo aŭ St-Aubin de Luigné) kiu liveras la legitimkartojn. La memvolaj kontribuaĵoj estu tute transpagataj al Registrolibro.

La Korespondanto ne prizorgas pri bulteno ; li aŭ ŝi ricevas la informojn de Registrolibro pro sia membreco kaj estas ankaŭ elektebla en la Administra konsilantaro.

## NEŬTRALECO

**Ĉiuj Registrocentroj kaj Korespondantoj de Registrolibro restu plej strikte neŭtralaj laŭ vidpuntoj politika, filozofia aŭ religia. Eblas engaĝiĝoj aŭ publikaj deklaroj de membro de Registrolibro nur kiam oni povas klare evidentigi necesecon aŭ bezonon de monda demokratio aŭ de mondaj supernaciaj institucioj.**

**RECIM-Mondo n°2 eldoniĝos en marto 2005.**
Alvoko estas farita al ĉiuj adresitoj de tiu numero 1 por peti vin sendi al ni vian informojn : protokoloj de aktiveco, projektoj kaj vidpunktoj ... antaŭ la fino de februaro 2005. Daniel Durand, Les Nids, 49190 ST-AUBIN DE LUIGNE. **info@recim.org**.

# GAZETARA RECENZO

## Kanado

**"NEWSLETTER"**

La Kanada Registrocentro de la Mondcivitanoj ĉiujare eldonas du bultenojn. Liliane Metz-Krencker analizis la lastajn numerojn kaj tiris el ili la informojn, kiujn ni transkribas en paĝo de la novaĵoj de la registrocentroj.

## Francio

**"Citoyens du Monde"**

Ĝi estas la nomo de la bulteno de la Franca Registrocentro de la mondcivitanoj.

En la numero 136, oni trovas la alvokon de la artistoj, rapide elvokita en RECIM-info n°1". Jen ĝia teksto :

> ### Alvoko de la Artistoj.
>
> *Al la aŭtoritata tutmondigo, ni starigu reale demokratajn kontraŭpovojn !*
>
> *La estonteco de la homaro tute ne povas okazi sur la kampo de la militara kaj ekonomia potenco de la ŝtatoj.*
>
> *La destino de la homaro dependas de la diverseco de ĝiaj kulturoj kaj scioj. Ĝi estas samtempe ligita al la necesa solidareco inter la popoloj.*
>
> *Ni, agantoj de la kultura vivo, konscias, ke la homoj havas ĉie en la mondo la samajn emociojn kaj la samajn esperojn. Ĉiuj sopiras al paco kaj al justa divido de la teraj fruktoj. La ĝermoj de perfortoj, kiom estas la mizero de la plimulto rilate al la abundo, kiun ĝuas malplimulto da terloĝantoj, la atmosferaj kaj akvaj poluadoj, la akaparo kaj la malŝparado de la fosiliaj energifontoj kaj de la maloftaj krudmaterialoj, la rapidega popolkreskado, la mona malordo, la plioftiĝo de perfortoj, de militoj kaj de fenomenoj pri sociaj ruiniĝoj...tiom problemas mondnivele kaj superas la kompetentecon de la naciŝtatoj.*
>
> *Jam je homa skalo ni konstatas la mensan manipuladon faratan de la ĉefaj mediatoj kaj la ĉiopovon de la transnaciaj firmaoj.*
>
> *Pli ol neniam, ĉiu el ni devas senti sin solidara de la homaro.*
>
> *En la tuta mondo, la registaroj aŭdos ju pli nian voĉon, despli ke ni estos multnombraj kaj pli volemaj. Ni konscias pri nia respondeco por elmerĝigi novigajn ideojn por anstataŭigi la novkapitalisman tutmondiĝon per sociala civilizita kaj justa organizaĵo.*
>
> ***Al ni civitanoj el ĉiuj landoj apartenas la devo konatigi niajn postulojn, deklarante nin "Civitanoj de la Mondo".***
>
> ***La unua ago, simpla sed efika, al kies plenumo ni invitas ĉiun el vi, estas registrigi vin kiel civitaninon aŭ civitanon de la mondo.***

Tiu alvoko subskribita de 66 artistoj, estis ankaŭ publikigita en la ĵurnalo Chorus.

La numero 137 entenis specialan kajeron tre ŝatitan de la legantoj : Kio estas tutmondismo ? Difino, organigramo de la organizaĵoj de la mondcivitana kaj mondfederaciista familio. Notinde, ke nova organigramo estas nun proponita, kun koloroj, en la paĝoj http://www. recim.org kaj kiujn ni reproduktas en tiu bulteno en paĝo 10.

La **numero 138** nete sin deklaras en unua paĝo kontraŭ la nuna strukturo de MOK, kiu sin prezentas kiel supernacian aŭtoritaton kun kaŝitaj praktikoj kaj neniel raportante al la popoloj de la mondo. Kaj en paĝoj 4 kaj 5 la bulteno invitas nin uzi niajn krajonojn por rezisti aŭ eĉ sekvi la ekzemplon de la tutmondiĝinta komunumo St-Nolff, kiu simbole deklaris sin "zono ekster-GKKS [1] ".

Tiu bulteno ankaŭ rememorigas al ni la necertan estontecon de 11.000 Tuvalanoj, loĝantoj de malgranda insularo minacata pro la plialtiĝo de la marnivelo. Ili estos la unuaj "klimataj rifuĝintoj en la planedo" post ĉirkaŭ kvindek jaroj. Por pli da informoj oni povas sin turni al Gilliane Le Gallic, kinisto kaj ankaŭ Delegitino al la Kongreso de la Popoloj : etcfrance@aol.com.

La **numero 139** reeldonas paroladon daŭre aktualan, kiun Guy Marchand prononcis dum la tutmondisma kolokvo en Grasse (Francio) en januaro 1992. Helpe de dosiero provizita de la asocio "Agadi tie ĉi" la bulteno donas ankaŭ klarigojn pri banko, kiun oni diras "monda", sed kiu ne estas tutmondista en la senco donita de la demokratoj.

## Japanio

La Japana Registrocentro dufoje jare eldonas bultenon en japana kaj en angla, verkita de ĝia prezidanto Mazaji Ie.

La traktitaj temoj, kiujn ni provos parte resumi esprimas la plej gravajn prizorgojn kaj la agadojn de la japanaj mondcivitanoj.

La lasta bulteno, kiun ni ricevis en majo 2004 surhavas la numeron 45, kio demonstras la malnovecon de tiu multjara regula eldonaĵo.

En la bulteno de novembro 2003 :

**UNESKO kaj la Mondcivitanoj laŭ Masaji Ie.**

La Ĉarto de UNESKO estis adoptita en Londono en 1945, tuj post la fino de la dua mondmilito kaj la celoj de UNESKO estas klare esprimitaj : "por kontribui en la paco kaj en la sekureco per impulsado al la internacia kunlaborado per edukako, scienco kaj kultura.

En 1946 tiu faka organizaĵo fariĝis membro de la granda familio de Unuiĝinta Naciaro. En septembro 2003 ĝi nombris 188 partoprenantajn ŝtatojn kaj ses regionojn, kiuj estas ĝiaj asociitaj membroj.

1. Ĝenerala Konsento pri Komerco kaj Servoj"

Depost 1950 UNESKO helpadas la subevoluintajn landojn kaj diskonatigis la japanan kulturon per la verkaĵoj de Kawabata Yasumari.

La ĉarto de UNESKO, kiu instigas al la intelekta kaj spirita solidareco de homaro havas ion komunan kun la mondcivitismo.

**La movado al la internacia punado de la krimoj, laŭ Kana Nakamura.**

La starigo de la Internacia Krima Kortumo estis granda momento en la movado por la monda justico. La statuto adoptita en Romo en 1998, fondis la IKK, kiu havis la ratifon de sesdek landoj kaj efektiviĝis la 1an de julio 2002. La juĝistoj kaj la prokuroroj estas elektitaj. Ĝis nun oni prezentis pli ol 400 kazoj al la kortumo. Sed tiu movado al la monda justico ankoraŭ ne estas ideala kaj restas multaj problemoj solvendaj. Ĉinio, Rusio kaj la konstantaj membroj de la Sekureca Konsilio ankoraŭ ne ratifis la IKK.

Eĉ la japana registaro ankoraŭ ne subskribis la traktaton. Sed malrapidaj progresoj iom post iom fariĝas.

**Internacia kooperado inter NRO :**

*Proponi servojn kaj solvi problemojn.* Laŭ Yoshiko Yukinaga.

Kio estas NRO ? Kie ili laboras kaj kiel la NRO faras kion la registaroj ne povas fari ? La helpo, kiun ili donas al homoj, estas nenio alia ol servo ; ili ne intervenas je la nivelo de la struktura problemo kiu estas la kaŭzo kaj kiu estas ofte kaŭzita de la registaro mem aŭ de la transnaciaj firmaoj.

Tamen la aktivecoj de la NRO ne limiĝas al helpo sed oni konsideru du aspektojn de ilia agado :

La unua al la popoloj de la riĉaj landoj kaj la dua je la nivelo de registaroj, de la registaraj organizaĵoj kaj de la transnaciaj firmaoj.

Ekzistas interrilatoj inter la tri niveloj.

Tamen en Japanio la situacio de la NRO estas relative malfirma. La plifortigo de la aktivecoj al la japana loĝantaro al la registaroj al la entreprenoj kaj internaciaj organizaĵoj estas nepre necesa por la strebo, kiun devas konsenti la NRO por la solvado de la problemoj.

*LMK*

## Belgio

Jean Verstraeten, direktoro de la Registrocentro de Flandra Belgio, regule eldonas bultenon "*Nieuwsbrief*" kies ekzempleron kun antaŭa prezento en angla li sendas al ni. *Ĉiuj niaj pardonpetoj al Jean Verstraeten, ĉar en sia rapidiĝo antaŭ sia jara transloĝiĝo al Aŭtralio Liliane, kiuj faris el ili sintezon, forperdis sian paperon. Ni faros tion en estonta eldono.*

*DD*

Registrolibro de la Mondcivitanoj

# INFORMOJ EL LA REGISTROCENTROJ KAJ KORESPONDANTOJ

## Aŭstralio

De longe estas konvinkitaj mondcivitanoj en Aŭstralio. Eĉ estas unu Mondcivitano, kiu fariĝis Delegito al la Kongreso de la Popoloj.

Iam ekzistis aktiva Registrocentro en Sidnejo.

Liliane Metz-Krencker dum restado en Aŭstralio en 2001 renkontis la Delegiton al la Kongreso de la Popoloj Keith Suter kaj Chris Hamer por provi relanĉi la Registrocentron. Ĉi lasta konsentis fariĝi la Korespondanto de Registrolibro en Sidnejo.

En 2002, 5000 flugfolioj estis printitaj kaj parte distribuitaj, kaj la 12an de decembro prelego por vasta publiko estis organizita en la Aŭstralia instituto de la internaciaj aferoj por prezenti la tre interesan libron de Chris Hamer publikigita en 1998 : "A global Parliament - Principles of World Federation".

Post tiu kunveno, kiu allogis multajn homojn, 10 mondcivitanoj enregistriĝis.

Komence de 2003, ili starigis standon dum la direktiga semajno en la Universitato de New South Wales por provi krei asocion da mondcivitanoj en la universitata areo. Komenca kunveno okazis la 5an de majo.

Nun estas nur 20 enskribitaj membroj sed pluraj estas agemaj kaj kun granda helpo.

La korespondanto deziras estigi jaran kotizon kaj komenci agadojn, kaj la nova grupo deziras ankaŭ kunlabori kun aliaj organizaĵoj.

*LMK*

## Kanado

La celoj de tiu asocio estas :

- plifortigi la konon de niaj respondecoj kiel civitanoj de la mondo ;
- plifortigi la konon de la mondaj problemoj kaj doni eblecojn de dialogo kaj edukado ;
- doni mondcivitanan legitimkarton al ĉiu homo, kiu per sia partopreno volas montri sian deziron identigi siajn respondecojn al la planedo kaj la loka komunumo ;
- antaŭenpuŝi kaj respektigi la principojn de la Universala Deklaracio de la Homaj Rajtoj.

La aktiva kerno de la kanada Registrocentro estas organizita laŭ la statuto de la asocio kaj entenas prezidantinon, vicprezidanton, kasiston, sekretarion taskitan per la aliĝoj, mediata sekretario, komisiito pri edukado, eldonanto sur Interreto kaj responsanto pri publikaj rilatoj.

Ĉiu mondcivitanoj rajtas baloti kaj rajtas pri unu voĉo sed li devas pagi sian jaran kotizon, kiu estas 20 kanadaj dolaroj.

La kanada Registrocentro publikigas raportojn pri ĉiuj siaj kunvenoj kaj jare du regulajn bultenojn.

La kanada Registrocentro enregistras jare averaĝe dek novajn mondcivitanojn.

Ĉiujare la kanada Registrocentro celebras la ekvinoksan feston kaj la pacan tagon en Aŭtuno. La Administra konsilantaro kunvenas ĉiun jaron en majo kaj la prezidantino venas kutime ĉiun jaron en printempo por ĉeesti la Ĝeneralan Asembleon de Registrolibro en Parizo.

Ĉiun monaton la Estraro aranĝas diskutgrupojn pri diversaj temoj kaj invitas prelegantojn.

Prezentitaj temoj dum la diskutkunvenoj :

- La mondcivitanino Julia Morton Marr, prezidantino de International Holistic tourism" prezentis la "Peace Garden Program" ;
- la mondcivitanino Janis Alton plenuma membro de "Canadian Voici of Women for Peace" prelegis pri la partopreno de la virinoj en la reorganizado de Afganio. Ŝia letero estis sendita al Kofi Annan, al la Prezidanto Bush, al Tony blair kaj multaj aliaj ;
- la mondcivitanino Marilyn Ashby, reprezentantino ĉe Unuiĝinta Naciaro por la Kampanjo por Tero prezentis pripensadon pri la mondregeco.

*LMK, laŭ la "Newsletters" de la Kanada Registrocentro.*

## KONGIO R.D.- Sud-Kivuto.

RECIM-Info n-ro 1 donis informojn tre pozitivajn pri la tutmondista grupo en Kalonge. Sed en tiu regiono de orienta Kongio, proksima al la Grandaj Lagoj, proksima al Ruando, la aferoj ne estas ĉiam tre simplaj : kiel paroli pri tutmondismo, kiel sin deklari mondcivitano en tiu regiono, kiu suferis du sinsekvajn militojn kaj neaŭdeblajn kruelaĵojn pro komenca depostulo koncernanta identecon, nacianecon de pluraj loĝantaroj en la montoj Mulenge en Sudo kaj en la teritorio Massissi en Nordo ? Tiu afero pri nacia identeco tute ne estas el la kompetenteco de Registrolibro, sed tamen tiu kunteksto kondukis al la arestado de 9 mondcivitanoj de Kalonge kaj Kavumu dum kunveno en Kalonge kaj al ilia malliberigo de la 31a de julio ĝis la 5a de aŭgusto en Kavumu kaj poste en karcero de Bukavu, pro tiu simpla malpravo, ke ili sin deklaris mondcivitanoj kaj ke ili sukcese atingis la tutmondiĝon de la ĉefloko Kalonge. Ili estis liberigitaj laŭ interveno de MONUC (Misio de Unuiĝinta Naciaro en Kongio). Klarigoj estis donitaj kaj de niaj amikoj en Kalonge kaj de ni mem al la provincaj aŭtoritatoj. De tiam la aferoj pliboniĝis, kaj la Kongolanda Radiotelevido eĉ citis kiel ekzemplon, en siaj elsendoj de la 25a kaj 26a de septembro, la eksperimenton de la tutmondiĝo de Kalonge.

El la ĉi supra malfeliĉa afero oni povas tiri la lecionon, ke la tutmondiĝo de Kalonge, kiu okazis dum milita periodo, kaj do en treege sentema kaj streĉa medio, ne estas finita. Multaj klarigoj ankoraŭ necesas, kaj sendube la animantoj de la Registrocentro bezonas el la sperto de pli malnovaj mondcivitanoj. Prie ili petis nin, ke estu organizita en Sud-Kivuto sesio por la klerigo pri la mondcivitaneco. Ni pripensas tion.

*DD*

## Germanio

Komence de la 90-aj jaroj Magdeburga sinjorino Inge GRZYB estis instigata aliĝi al la organizoj de mondcivitanoj, tre baldaŭ ŝi fondis kaj regis la registrejon de mondcivitanoj, ne nur por Magdeburgo, sed por aliĝemuloj el la tuta Germanio. Pro ŝia persista agado, afabla varbado, senlaca kaj daŭra prezentado de la ideo de mondcivitaneco ŝi intertempe estas forta bazo por la movado en Germanio, Eŭropo kaj en la mondo.

2004 kelkaj membroj en Magdeburgo sin decidis ne nur esti membroj, sed persone aktive kontribui al la disvastigado de la ideo.

Nia ĝeneralaj celoj kaj la plej gravaj planeroj estu listigataj tie ĉi:

- Doni puŝojn por la edukado de la homa konsciiĝo al mondcivitaneco ;
- Varbi novajn mondcivitanojn ;
- Kunlabori kun grupoj kaj homoj kun same la similaj celoj ;
- Krei interesan programon por la agado, kaj la publikado pri tio ;
- Kolektadi membrojn en la ĉirkaŭaĵo ;
- Partopreni la konvenajn publikajn konferencojn aŭ prezentadojn aŭ festojn ;
- Organizi proprajn okazaĵojn kun simpatiantoj ktp. .

Ni formis grupon, ellaboris ĝeneralan planon kaj planon por la kuranta jaro.

Estis kreita hejmpaĝo http://www.geocities.com/weltbuergermagdeburg , ni zorgos pri la flegado kaj aktualigado, instalis retadresojn por la respondeculo Gerhard HIRSCHMANN (moncivitano@planet.ms ) kaj respondeculino de la registrocentro Inge GRZYB (ingegrzyb@planet.ms )

Pluajn informojn vi povas legi sub nia hejmpaĝo http://www.geocities.com/weltbuergermagdeburg .

*Raporto de s-ro Gerhard HIRSCHMANN, loka respondeculo, mondcivitano, Esperantisto, UEA, GEA ktp. Magdeburgo, la 29-an de oktobro 2004*

## Senegalio

La agado de la Dakara Mondcivitana Registrocentro vere rekomenciĝis dank'al la vizito farita en la komenco de la jaro 2004 de Roger Winterhalter, animanto de la Hejmo de la Mondcivitaneco, en Mulhuzo, sed ankaŭ prezidanto de la Kongreso de la Popoloj. La kunvenoj sin sekvis kaj la Estraro de la Registrocentro estas rekonsistigita.

Surloke mi daŭrigas la laboron por konsciiĝo,

*(Daŭrigo en paĝo 12)*

# LISTO DE LA REGISTROCENTROJ KAJ KORESPONDANTOJ DE REGISTROLIBRO

## REGISTROCENTROJ

***Internacia Centro :***
Civitanoj de la Mondo, 66 Bd Vincent Auriol, 75013 PARIS, Francio
(Tel. 0145 8603 58)

**BURKINIO**
Citoyens du Monde, pa/ CAFES,
01 BP 6368, OUAGADOUGOU 01.

**KANADA**
World Citizens in Canada,
Dorothea F.M.SHEASBY,
688 Green Meadow Crescent,
MISSISSAUGA, ONTARIO L5A 2V2

**KONGIO R.D.**
Citoyens du Monde, pa/ SMAE,
(Butwashenge, Kalonge, Sud-Kivu),
BP 470, CYANGUGU Rwanda

**FRANCIO**
Citoyens du Monde,
15 rue Victor Duruy, FR 75015 PARIS

**JAPANIO**
World Citizens, **c/o** Masaji IE,
1.2.17 Suzurendai, Kitimachi Kita Ku,
JP 651 11 KOBE

**MALAGASIO**
Citoyens du Monde, Lot IVF 98,
Behoririka, ANTANANARIVO

**SENEGALIO**
Citoyens du Monde,
s/c Landing NIASSY,
BP 20336, DAKAR-THIROYE

**SVISIO**
Citoyens du Monde, Case Postale,
CH 1038 BERCHER

## KORESPONDANTOJ DE REGISTROLIBRO

**ALĜERIO :**
- § Mohammed Abdou DIB,
  12 bd de la République,
  DZ 22000 SIDI BEL-ABBES
- § Khemisti BECHAIRIA, BP 1529
  DZ 41000 SOUK AHRAS
- § Amel DJEMAI , Cité HLM,
  Place des Martyrs, Bt.B.n°8,
  DZ 42100 CHERCHELL/TIPAZA

**GERMANIO<**
- § Barthold OLBERS,
  c/o Myslik, Spliedtring 49,
  DE 22119 HAMBURG
- § Inge GRZYB, Fröbelstrasse 6,
  DE 39110 MAGDEBURG

**ANDORO**
Joseph Lluis ORTEGA MATAS,
Av.Rocafort 2, SANT JULIA DE LORIA

**ALBANIO**
Adriana GJIKA,
Universiteti Teknologjik,
Rr "S.Zotaj", Pall 1175, VLORE.

**ARGENTINO**
Nevenka CALVO KUCHAN
Colon 1184 - 5° 13
AR 7600 MAL DEL PLATA

**AUSTRALIO**
Christopher HAMER, 34 Caravan Head Road, OYSTER BAY, NSW 2225

**BELGIO KAJ NEDERLANDO :**
Jean VERSTRAETEN,
65 Vredestraat,
BE 2540 HOVE

**BRAZILO**
Ursula GRATTAPAGLIA, CP 37,
BR 73.770-000 ALTA PARAISO GO

**KAMERUNIO**
David FONCHO, pa/ pr Chindji Kouleu,
BP 1803, **YAOUNDE**

**KONGOLANDO**
Jean Pierre BERRI, BP 984,
BRAZZAVILLE

**KONGIO R.D.**
- § Elvis MBIYA TEKADIOMONA,
  126Bis, Avenue Mobutu, BP 267
  Mbanza-Ngungu, Bas-Congo.
- § Faustin SHETA MIKAYELE KK,

**EBURIO**
DIARRA BAKOROBA, s/c Mme Delon,
BP 1513 YAMOUSSOUKRO

**HISPANIO**
José-Maria CASAS-HUGUET,
Rbla. Llibertat, 94-101, 5è.,
ES 08800 VILANOVA I LA GELTRU

**GABONO :**
Gervais Truffault M'BITA,
Apt 281, Likouala IV, 3 Ardt,
B.P. 4846, LIBREVILLE

**GANAO**
Karl A.Y. KPODO,
P.O. Box 6289, ACCRA-NORTH

**BRITIO :**
John ROBERTS 19 White Horses Way
LITTLEHAMPTON - West Sussex
BN17 6NH

**HINDIO :**
- § PRASANNANSHU, 943, Block 34,
  D.D.A. Flats, Kalkaji,
  IN 110019 NEW DELHI
- § Leo REBELLO, 28/552 Samata Nagar, Kandivli East,
  IN 400101 MUMBAI (Bombay)

**KROATIO**
Mato SPEKULIAK, Ostarijska 8 HR
10000 ZAGREB

**LITOVIO**
Alfredas MARUSKA, pk 3329,
LT 2013 VILNIUS

**MAROKO**
Abdillah SAANDI, apt 15 LIDO,
9 bd Mohamed Belarbi Allaoui,
MA 30000 FES

**PAKISTANO**
Imran Yousuf MUHAMMAD,
F-13/32, Block 5, CLIFTON, KARACHI

**POLLANDO**
- § Pawel PETASZ, Chopina 6,
  PL 82300 ELBLAG
- § Ireneo WILCZYNSKI,
  78/155 ul. Malczewskiego
  PL 80-107 GDANSK

**RUMANIO**
Dorin HEHN, Str A. Saguna, A4, Ap.4,
RO 1900, TIMISOARA

**RUSIO**
Georguy GONTCHAROV, Apt 307,
Oulitsa Tvardovskovo,31, MOSCOU

**SVEDIO**
Gunnar EKEGARD, PO.Box 1213,
SE 751 42 UPPSALA

**SVISIO (germanlingva) :**
Claudius SCHAUFFLER, Dorfhalde 4,
CH 3612 Steffisburg

**SIRIO**
Eric SAUVAT, PO box 3445, HOMS
(correspondant provisoire)

**TANZANIO**
Janet MUKIMBILI, c/o KARADEA,
Box 99, Karagwe, KAGERA

**TOGOLANDO**
François TETE, BP 13260, LOME

***Esperantista Internacia Centro :***
Geneviève CHARPENTIER,
32 C rue Jean Perrin,
FR 77190 DAMMARIE LES LYS
(Francio)

# TUTMONDIĜINTAJ KOMUNUMOJ

**KONGIO R.D.**

## MBANZA NGUNGU, tutmondiĝinta urbo

Mbanza Ngungu estas la ĉefurbo de la provinco Bas-Congo (Malalta Kongo) je ĉirkaŭ 200 km okcidente de Kinŝaso.

Jam de longaj jaroj estas en Mbanza Ngungu bona grupeto da Mondcivitanoj, ĉar Kinŝaso ne estas malproksima kaj tie staris de la komencantaj 80aj jaroj tre aktiva Registrocentro sub la gvidado de la direktoro Sheta Mikayele. Depost 1992 la aferoj fariĝis pli malfacilaj pro la konfuzegoj kaj disrabadoj kaj pro la tuta periodo de malfortiĝo de la Mobutua erao ĝis la milito, kiu atingis Kinŝason samtempe de oriento kaj de okcidento.

De la komenciĝo de la 90aj jaroj, la korespondado kun la diversaj Mondcivitanaj grupoj de tiu regiono fariĝis sen akurateco kaj hazardaj, pro sinsekvaj strikoj de la poŝto. Sed feliĉe venis la Interreta erao, kiu ebligis realan malenklavigon. Nun la aktiveco de la Mondcivitano prenis novan impeton. Kaj kiam la Mondcivitanoj de Mbanza Ngungu eksciis, ke tiuj de Kalonge (je 1.500 km de tie) sukcesis tutmondigi sian ĉeflokon, ili aktiviĝis por havi la saman rezultaton en sia komunumo. Tiamaniere Mbanza Ngungu, politika ĉefurbo de Bas-Congo tutmondiĝis per la subskribo de la ĉarto la 2an de aŭgusto 2004.

**CHELLES (Francio)**

## SALUTON CIVITANO !



Kiel sur strato, tiel en bazaro, tiel ĉe la enirejo de kunvenĉambro aŭ ĉe telefono, tiu kiun Maurice tiamaniere alparolis, ne povis ignori tiun veksaluton.


Maurice estis partoprenintaj en pluraj ĝeneralaj asembleoj de la franca Registrocentro de la Mondcivitanoj. Tie mi kelkfoje renkontis lin. Mi amuziĝis reciprokigi lian saluton per "Saluton, Prezidento", alude al provoka deklarita kandidatiĝo al la francia prezidenteco en 1981. Ĉiam afabla, sed rekta kaj sen mieno, preta por denunci la stultecon, li sciis bonkore sin engaĝi por la ideoj, kiuj gravis al li. La tutmondiĝo de Chelles, la 22an de decembro 2001 estas ŝuldita al li, kaj sendube ankaŭ la monumento al la Homaj Rajtoj.

En aprilo 2004, li organizis en la urbodomo de Chelles renkonton kun kelkaj Mondcivitanoj el germanlingva Svisio : Claudius Schauffler, Michael Ehinger, Eva Irmann. Okazo kiel alia por krei ligojn trans la naciajn aŭ komunumajn landlimojn, okazo por prediki fratecon inter homoj, inter popoloj. Chelles estas unu el maloftaj tutmondiĝintaj urboj, kiuj zorgis komitaton "Tutmondiĝinta Urbo". Oni facile divenas kiu partoprenis en ĝi !

Maurice forpasis la 5an de oktobro, en la aĝo de 78 jaroj.

*DD*

**Francio**




MONDA SOLIDARECO okazigis kunvenon de sia tagoj en unu el la urbaj Trafa okazo por la ***Valentré*** konstati, ke ... ! ve, **de la monda vojo n-ro 1** eksciis, ke la koloneto estis aŭgusta fino aŭ komenca de kontraŭulo ? ĉu de Sekvota afero !

KONTRAŬ LA MALSATO Administra Konsilantaro dum tri kunvenĉambroj de Cahors. Mondcivitanoj iri al la ***ponto*** la koloneto indikanta la **km NUL** malaperis ! Per enketo ni malboltita dum nokto de septembro. Ĉu tio esta la faro maldelikata kolektanto ?

**Anoncetoj :**

♦ la Infaneta kaj Baza Lernejo en KAVUMU (Kongio R.D.), tutmondiĝinta lernejo, deziras havi korespondajn kaj pedagogiajn interŝanĝojn en Esperanto kun aliaj tutmondiĝintaj lernejoj.

EMPK, BP 470, CYANGUGU, Ruando.

♦ La tutmondiĝa komitato de KALONGE (Kongio R.D.) deziras partnerecon por la ekipado de flegejo.

FCRaiffeisen, BP 470, CYANGUGU, Ruando.

♦ La tutmondiĝinta urbo MBANZA NGUNGU (Malalta Kongo, Kongio R.D.) deziras starigi ĝemeligajn kontaktojn kun aliaj tutmondiĝintaj komunumoj.

Kontaktu Elvis Mbiya Tekadiomona, adreso en paĝo 7.

**Belgio**

# DISON



Yvan Ylief, vicurbestro de Dison, tutmondiĝinta komunumo en 1983, ricevis la 4an de lasta junio la antverpenan grupon da Mondcivitanoj "Planeda Homo", kies ĉefa animanto estas Jacques Lefrançois. Tiu akcepto estis okazo por tiuj tutmondistoj enmanigi diversajn dokumentojn al la urba municipo, interalie mesaĝon de la Kongreso de la Popoloj farovan al la konsistigo de mondfederacia registaro, kaj por Jacques Lefrançois la okazo diri kelkajn el la plagoj, kiuj minacas la vivon sur la tero : "maldrastaj dehakadoj en la tropikaj arbaroj, ruinigo de la granda amazona arbaro, detruado de la balenoj kaj de la oceanaj fiŝaj aregoj, detruado de la neanstataŭigeblaj polenaj abeloj atakitaj per tre nocaj substancoj". "Mi venis por lanĉi alarmkrion" li konkludis.

Al tiu iniciato estos sekvo venontan jaron. Efektive, unu el la partoprenantoj en tiu kunveno de Dison havas bonajn rilatojn kun la municipo de Stabroek, grava komunumo proksima al Antverpeno. Kaj la invitado estas tre oficiale farita de la municipestro Alex Bastiaenssens kaj lia sekretario Luc Joppen, por simila akcepto en la urbodomo la 4an de junio 2005. Ni klopodos, por ke la Komisiono pri tutmondiĝoj aŭ iu ajn el niaj institucioj ĉeestu tion.

Ä Jacques Lefrançois, Leo Baekelandstraat 9, BE 2030 ANTVERPENO, Belgio

---

### Jean-Claude Loewinski, kavaliro de la Honora Legio.

Ĉiuj, kiuj ĉeestadis la Ĝeneralajn asembleojn kaj la kunvenojn de la Administra konsilantaro kaj de Mondcivitana Registrolibro, kaj de la Franca Registrocentro de la Mondcivitanoj bone konas Jean Claude. Li ne nur preparas la sandviĉojn kaj ties akompanaĵojn, sed ankaŭ scias interveni en la debatojn kun forto kaj konvinko por diri tion, kio ŝajnas al li grava en nia klopodado al la tutmonda demokratio. La 9an de decembro 1948 li ĉeestis en la pariza vintra ciklodromo kun Garry Davis kaj Robert Sarrazac, kaj de tiam li montris senmankan fidelecon al la mondcivitaneco. Foje li ne ĉeestis la kunvenojn de la strato Victor Duruy aŭ de bulvardo Vincent Auriol, ĉar li aktiviĝis en aliaj frontoj : la eksa rezistanto pasiiĝis por la respekto de la medio, kaj kiel membro de la fiŝkapta asocio "La Darse" kie li plenumis respondecojn dum 26 jaroj, kaj kiel membro de la Higiena konsilio de la departemento "Val de Marne", kie li kunsidis dum 33 jaroj.

Jean Claude fariĝis Kavaliro de la Honorlegio per dekreto de la respublika prezidento. Certe tio ne okazis pro liaj tutmondistaj konvinkoj, sed ni fieras havi inter ni iun, kiel lin, kiu scias kiun mondon li volas, kaj kiu engaĝiĝas en la mondon tian, kia ĝi estas.

Gratulojn Jean-claude

*DD*

# UNESKO

De 1988 Registrolibro de la Mondcivitanoj estis membro de la Komitato inter NRO en UNESKO, en kategorio C. Plenumis tiun reprezentadon Guy Marchand ĝis sia forpaso en 1993. Pro la statuta ŝanĝiĝo de la Inter-NRO Komitato ĉe UNESKO, en 1995, ni devis konsistigi novan dosieron pruvantan, ke Registrolibro plenigis la novajn partoprenajn kondiĉojn. Tiu dosiero estis prezentita fine de oktobro 2004. Nia reprezentantino estos S-ino Hermine Togbé-Olory, al kiu oni povas skribi tra la sidejo de Registrolibro en Parizo.

Registrolibro de la Mondcivitanoj suferos unujaran observadon. Post unu jaro ni devos prezenti al UNESKO raporton devenantan de la Registrocentroj kaj de la Korespondantoj detalantan la faritajn agadojn por la antaŭenpuŝo de unu aŭ pluraj el la celoj de UNESKO.


**La komuna celo de UNESKO kaj Registrolibro estas la edukado al civitismo, al civitaneco, al antaŭgardo de la planedo, al respekto de la kultura diverseco de la loĝantaroj.**

**Mi do petas de nun ĉiujn responsantojn de Registrocentroj kaj korespondantojn de Registrolibro aranĝi agadojn en tiu senco kaj produkti al ni la raportojn.**

Tiu kunlaborado UNESKO-REGISTROLIBRO estis dezirata de pluraj korespondantoj. Ĝi povas esti nu profita al ni.

*Daniel Durand*

# Nia ORGANIGRAMo




<u>**Tri ĉefaj aroj**</u> :
1. la aro konsistigita de **Registrolibro de la Mondcivitanoj** kaj de la **tutmondiĝintaj komunumoj kaj organizaĵoj**.
2. la **Kongreso de la Popoloj** kaj ties kreaĵoj ;
3. la **Konsulta Asembleo ĉe la Kongreso de la Popoloj** ( ASKOP )

♦ 1a. **Registrolibro de la Mondcivitanoj** fondita en 1949. Ĝi kontrolas en ĉiuj landoj la liveradon de mondcivitanaj legitimkartoj. Registrolibro starigas tra la mondo Registrocentrojn kaj Korespondantojn, nun je la nombro de 43.

♦1b La tutmondiĝoj, lanĉitaj en 1949, unue rezervitaj al la geografiaj komunumoj (nun 960) estas nun plivastigita al la civilsociaj organizaĵoj (nun : 56).

***La aro 1a + 1b konsistigas la mondan voĉdonantaron.***

♦ 1c. La eldona societo "**Club Humaniste**" kreita en 1971 de Registrolibro laŭ iniciato de Jean Rostand, eldonas referencajn tekstojn pri tutmondismo. Sume ĉirkaŭ 20 libroj estis publikigitaj. Kelkaj elĉerpiĝintaj, sed kun enhavo ankoraŭ aktuala, estas reviziataj al reeldonado.

♦ 2. La **Kongreso de la Popoloj** estis imagita dum internacia kunveno de tutmondistaj organizaĵoj okazinta en Bruselo en 1963. La alvoko de la 13, lanĉita la 3an de marto 1966, fariĝis plej grava dato en la freŝdata historio de la monda civitaneco. La balotelektoj okazis de 1969 ĝis 1998, kun la partopreno de voĉdonantaro de pli ol 100.000 homoj el 120 landoj. La estonta balotelekto estas planita en 2007 por la renovigo de unu triono el la elektitaj Delegitoj.

La Kongreso de la Popoloj kreis :
a) **la Instituton por Tutmondismaj Studoj** en 1977 ; b) gazetagentejon **"AMIP"** en 1980 ; c) **Mondan Solidarecon kontraŭ la Malsato** en 1982 ; d) la Konsultan Asembleon ĉe la Kongreso de la Popoloj en 2003-2004. Estas planita por 2007 la kreado de Konsilio da Saĝuloj kun arbitracia funkcio.

3. **La Konsulta Asembleo ĉe la Kongreso de la Popoloj - ASKOP** - staras kiel nia nova instrumento de partoprena demokratio. Ĝi estas malferma al aliĝo :

- 3a. de ĉiuj organizaĵoj ligitaj al la mondcivitaneco : Registrolibro, Registrocentroj, tutmondiĝintaj komunumoj aŭ iliaj komisionoj "Tutmondiĝinta Urbo" aŭ iliaj ĝemel-komitatoj, la tutmondiĝintaj organizaĵoj, la institucioj kreitaj de la Kongreso de la Popoloj, **same kiel ĉiuj organizaĵoj konsentantaj kun la Mulhuza ĉarto** (v. paĝo 11) ;
- 3b. de ĉiuj individuoj, kiuj deziras tion, sine de elektronika forumo lanĉita en la komenco de oktobro 2004 :

**http : //ascop.editme.com**

# KONSULTA ASEMBLEO ĈE LA KONGRESO DE LA POPOLOJ
# ASKOP

## Sukceso de la kunveno de Mulhuzo

Post tre simpatia akcepta vespero en la Hejmo de la Monda Civitaneco, la partoprenantoj pasigis ambaŭ diurnojn en la Junulara gastejo de Mulhuzo : noktejo, restoracio kaj kunvenĉambroj estis je la sama adreso kaj ebligis plej bonajn kontaktojn ligiĝi kaj elvolviĝi. La 55 partoprenantoj "reprezentis" 17 naciajn devenojn. Kelkaj venis de tre malproksime : Dorin Hehn el Rumanio, Dauji Gupta el Lucknow en Hindio, Landing el Dakaro, Rob Wheeler kaj Fernando el Novjorko. Tiuj partoprenantoj reprezentis ankaŭ 12 asociojn, kiuj estas membroj de ASKOP.

La planita programo estis tute respektita kaj plenumita. Ne ni faros tie ĉi la protokolon. Tiu ĉi estas redaktata aŭ kunmetata en la Hejmo de la Monda Civitaneco kaj estos disponebla tre baldaŭ. RECIM-Info, en januaro-februaro dediĉos kelkajn paĝojn al tiu evento. Jen la rezultatoj per kelkaj linioj :

- unua laborkunveno traktis pri la projekto de Tutmondisma somera universitato. La unua sesio okazos en La Chaŭ de Fonds (Svisio) de la 23a ĝis la 29a de julio 2006.
- dua laborkunveno traktis pri sporta projekto ! La unua ideo estas la aranĝo de bicikla paco-rondiro ; la dua ideo estas la aranĝo de Mondaj Paco-Sportludoj.
- tria laborkunveno diskutis pri la ĝenerala temo de paco, malarmado.
- en plena kunsido, la asembleo laboris pri mediprotektado. Deklaracio estis adoptita, kaj dum la jaro 2005 ASKOP kontribuos en la plifortigo de kampanjo por tutmonda aŭtoritato pri medio. Tio estos la ĉefa temo de RECIM-Info n-ro 3 de julio-aŭgusto 2005.
- la dimanĉa mateno estis tre produktodona, kun la ratifo de la Reglamento, la adopto de la apuda Ĉarto de ASKOP, la balotelekto de la Estraro kaj de la Transnacia Gvid-Komitato konforme al la Reglamento.
- dimanĉa matenfino kaj posttagmezo estis dediĉitaj al la Koalicio por Tutmonda Parlamento. (Vidu en RECIM-Info n-ro 1, p. 7). Per relative peniga maniero, sed kun sukceso, estis starigita kunlabora fundamento inter la Koalicio kaj la tuto de la ASKOPaj organizaĵoj.

## ANTAŬEN ASKOP !

Samtempe kiel tiu bulteno, vi ricevas oranĝkoloran flugfolion, per kiu ĉiu estas invitata por partopreni en la renkontoj kaj debatoj de la Konsulta Asembleo ĉe la Kongreso de la Popoloj.

Ĉu la estonta kunveno de ASKOP okazos en Parizo ? Ĉaŭdefono ? Niceo ? Dakaro ? Vagaduguo ? Mbanza Ngungu, Novjorko ? ... la membraj organizaĵoj mem iniciatu !

La forumejo de ASKOP nun funkcias :

**http://ascop.editme.com**

## ĈARTO DE ASKOP

Ni, membroj de la Konsulta Asembleo ĉe la Kongreso de la Popoloj, opinias ke la agnosko pri la digno rilata al ĉiuj membroj de la homa familio kaj pri iliaj rajtoj egalaj kaj neforigeblaj konsistigas la fundamenton de libero, justo kaj paco en la mondo.

***Ni konstatas***

- oftan opozicion inter la naciŝtataj interesoj kaj la interesoj de la monda popolo, same kiel la mankon de ĉia transnacia aŭtoritato demokratie elektita por gardi ĝiajn interesojn ;
- ke malsato, mizero kaj milito ne estas fatalaĵo, sed la sekvoj de la politika organizo de la planedo ;
- la neceson konstrui sociojn demokratiajn. justajn, partoprenajn, daŭrajn kaj pacajn ;
- ke la mondaj problemoj postulas globajn solvojn kiuj respektas la diversecon de la homa familio ;
- ke la homoj endanĝerigas la riĉaĵojn de nia planedo per intensiva ekspluato de la grundo, de la subgrundo kaj de la maroj ;
- ke la individuoj kaj la grupoj agas plej ofte en maniero egoisma, ne zorgante pro la aliaj, precipe kiam ili estas foraj.

***Ni volas***

- partopreni en la kreo de demokratia monda parlamento. el kiu unu la modeloj estas la Kongreso de la Popoloj ;
- promocii la pacon, la rifuzon pri diskriminacioj, la egalecon antaŭ la leĝo kaj la spiriton de solidareco ;
- krei spacon par reflektoj kaj interŝanĝoj malfermitan al ĉiuj, kaj kontribui al la konstruado de solidareca mondo, kunigante la iniciatojn de tie kaj aliloke ;
- riĉiĝi per niaj diversecoj por trovi niajn similecojn, kupli niajn reflektojn al eksperimentado kaj agado konkreta sur la tereno ;
- gardi la riĉaĵojn kaj la biodiversecon de nia planedo por la nuna kaj estontaj generacioj ;
- ke ĉiu individuo kaj grupo estu responsaj pri la bonfarto de la aliaj kaj la harmonia evoluo de la planedo.

***Ni alvokas*** ĉiun organismon kaj ĉiun individuon kies idealoj estas mondcivitismaj kaj demokratiaj aliĝi al la Konsulta Asembleo ĉe la Kongreso de la Popoloj por kunkonstrui alian mondon, pli bonan, unuiĝintan. plurkulturan kaj pacan, subskrihante ĉi tiun Ĉarton.

En Mulhuzo, la 3an de oktobro 2004.

(Daŭrigo de la paĝo 6)
vulgarigo kaj informado rilate al mondcivitaneco. Krom la jam formita estraro, la komisionoj Monda Solidareco Kontraŭ la Malsato, kaj Instituto de Tutmondismaj Studoj, ankaŭ anteno nomita universitata de Dakaro estas kreita por la studentoj de la universito Cheikh Anta Diop kaj la Superaj lernejoj en Dakaro. Tiu studenta organizaĵo jam faris du kunvenojn kaj havas sian estraron. ... (4/08/04)

*Landing Niassy*

Landing havis la feliĉon povi partopreni en la kunveno de la Konsultiĝa Asembleo ĉe la Kongreso de la Popoloj en Mulhuzo.

## Burkinio

De la 20a ĝis la 22a de oktobro 2004 okazis en Burkinio en la konferenco-centro de l'UENOA la unua Forumo de la civila socio pri la temo "Solidaraj spacoj por daŭra disvolviĝo" prepare al la 10a ĉefkonferenco de Franclingvio, kiu okazis en Vagaduguo de la 26a ĝis la 27a de novembro 2004. Pli ol 500 homoj de la franclingva medio partoprenis en tiu grava renkontiĝo. Profitante el tiu okazo ni kunluis standon kun SPONG por prezenti la Mondcivitanan Registrocentron de Vagaduguo. Tiel ni povis retrovi kelkajn mondcivitanojn, kiuj pasis ĉe nia stando.

*Souleymane Drabo.*

## Pollando

Nova korespondanto en Pollando : Ireneo Wilczynski, varbita de Geneviève Charpentier. En januaro 2004, Ireneo enpresis en la lokan gazeton "Gdanska Esperantisto" la deklaracion de la 13 en pola lingvo.

## Belgio

La Flandra Mondcivitana Registrocentro organizis kunvenon en Hove sabate la 27an de novembro .

## Andoro

Josep Ortega havis la projekton krei "enregistradon" por iu komunumo da mondcivitanoj. Poste il ekkonis la Mondcivitanan Registrolibron, ties historion kaj la nunan renovigon. Post renkonto en Cahors, Josep proponis al siaj amikoj kunfandiĝon en la Registrolibron. Li konsentis fariĝi Korespondanto en Andoro, kaj promesis animi la ASKOP-forumon. En Mulhuzo ASKOP petis lin fariĝi la ĉefkunordiganto de la Transnacia Gvid-Komitato. Brave al Josep pro tiom da sinofero kaj bonkoreco !

*DD*

____________________

Ĉiuj adresoj de la Registrocentroj kaj de la Korespondantoj estas publikigitaj en paĝo 7. En RECIM-Info aŭ en la estontaj numeroj de RECIM-Mondo, ni aldonos la retpoŝtajn adresojn kiam la posedantoj konsentos, ke ili estu publikigitaj

**Mondcivitana legitimkarto aŭ Provizora atesto al enregistriĝo ?**

La oficiala prezo de la mondcivitana legitimkarto estas 15 eŭroj. Reduktita prezo estas proponita al ĉiuj, kies rimedoj estas malaltaj, je 7,50 € aŭ 8 $. Legitimkarto ne povas esti liverata senpage.

Tiu prezo estas ankoraŭ tro alta por multaj "kandidatoj". Al tiuj ĉi ni ofertas, kiel eksperimenton, la eblecon ricevi Provizoran ateston al enregistriĝo valida dum 3 jaroj kaj renovigebla laŭ simpla peto, kio lasas tempon aŭ ŝpari monon, aŭ pagi iom post iom la konvenan prezon.

*DD*

# PARIZO, 12 rue des Fossés St-Jacques (75005), LA 12AN KAJ 13AN DE MARTO 2005

# 3 kunvenoj !

- **Sabate la 12an de marto, de 9a h 00 ĝis 15 h 30 : kunveno de la Administra Konsilantaro de Registrolibro de la Mondcivitanoj**. La membroj de la Administra Konsilantaro notu tiun daton kaj sendu sen atendi siajn entagordigajn propronojn al Daniel Durand, prezidanto : info@recim.org. La definitiva kunvokilo kaj la tagordo estos senditaj al la koncernatoj en januaro 2005. tiu kunveno estas malferma al la ĉeesto de ĉiuj ajn mondcivitanoj
Daniel Durand, Les Nids, FR 49190 ST AUBIN DE LUIGNE Francio.
- **de 16 h 00 ĝis 19 h 00 : kunveno de la Komisiono pri Tutmondiĝoj**. La membroj de la komisiono, la reprezentantoj de la komisionoj "Tutmondiĝa Urbo" kaj la interesatoj ekrilatu kun la respondecantoj de la komisiono : Roger Winterhalter,
Maison de la Citoyenneté Mondiale, 20 rue Paul Schutzenberger, 68200 Mulhouse. mcm.arso@wanadoo.fr
- **Dimanĉe la 13an de marto, de 9 h 00 ĝis 16 h 00** : kunveno de la reprezentantoj de la membraj organizaĵoj de **Konsulta Asembleo ĉe la Kongreso de la Popoloj**. La definitiva kunvokilo kaj la tagordo estos senditaj de la Ĝenerala sekretariino :
Marie Martin-Pecheux, Mouvement Citerrien, BP 2058, 06101 NICE cedex 2. citerre@wanadoo.fr

RECIM-Mondo estas eldonaĵo de Registrolibro de la Mondcivitanoj. La servo estas dirata senpaga. Tamen Registrolibro akceptas ĉiujn memvolajn kontribuojn : per monbiletoj, mandatoj aŭ per poŝta ĝiro al :
CCP PARIS 2848 94 Y je la ordo de Registre des Citoyens du Monde.
**IBAN : FR 46 30041 00001 0284894Y020 02 - Bank Identifier Code : PSSTFRPPPAR**



Imprimé à « Les Nids » 49190 St-Aubin de Luigné par les moyens de l'association.